# 89a Brita Kongreso de Esperanto

Kongreslibro



## Southport

### Hotelo
### Prince of Wales
### Lord Street

### 9 – 11 de majo 2008



## Nia alta protektanto …



… estas Lordo **Ronnie Fearn** OBE, Southport-deputito (1987-2001) kaj nun membro de la supera ĉambro, kaj Sefton-magistratano ekde 1963. Li estas fotita (dekstre) kun lia posteulo, **John Pugh MP**. Ambaŭ estas liberaldemokratoj. Lordo Fearn skribis:

*'As cabinet member for leisure and tourism, may I welcome delegates to Southport. It seems that the town has a special niche for the Esperanto Association, as this visit follows those held here in the years 1911, 1932, 1948 and 1962. As your honorary congress president, I wish you all a very fruitful and enjoyable time in Southport.'*

**Solene malfermos** la kongreson la altestimata urbestro de Sefton, magistratano **Richard Hands**, kiun akompanos la urbestrino, s-ino **Katy Hibbert**.

**La kongresejo**

Bv. noti, ke ĉambro Steele situas unuaetaĝe kaj atingeblas lifte aŭ ŝtupare. Manĝoj haveblas en la hotelo (informiĝu ĉe la hotela akceptejo); ankaŭ en restoracioj kaj kafejoj ĉirkaŭ la hotelo (precipe Lord Street kaj en la direkto de la maro).

**Pro foresto** pardonpetis **David Sumberg MEP** (Kons.), kiu skribis: *'I know … of the vital need to enhance communication between different nationalities and I am sure that Esperanto has a vital part to play in achieving this important objective. I … hope that you and all the delegates have a very successful conference and wish everyone "bona fortuna"!'*; **Brian Simpson MEP** (Lab.), kiu skribis: *'I think the value of learning other languages is immense. The idea of Esperanto as a universal language would be the best step forward. My commitment is for people to learn other languages be it a national language … or Esperanto'*; **Arlene McCarthy MEP** (Lab.), kiu ne sendis mesaĝon. Ĉiuj naŭ nord-okcidentaj deputitoj de la Eŭropa Parlamento estas invititaj al la kongreso: ne reagis la aliaj.

## Nia gastparolanto ...



**Roman Dobrzynski** estas longjara ĵurnalisto kaj reĝisoro de dokumentaj filmoj ĉe Pola Televido. Li profesie okupiĝis ĉefe pri Iberoameriko (inkluzive de Hispanujo kaj Portugalujo). Pri la sama temo li publikigis ok librojn en la pola lingvo.

Li esperantistiĝis en 1955 kaj plenumis diversajn funkciojn en la movado. Interalie li estis prezidanto de Pola Esperanto-Asocio kaj vicprezidanto de UEA. En 2005 li estis nomumita honora membro de UEA.

En Esperanto-literaturo li debutis en 2003 per libro *La Zamenhof-strato*, verkita laŭ interparoloj kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. La libro estas tradukita en dekkelko da lingvoj.

Li esperantigis la televidan filmon de BBC *Mazi en Gondolando* kiel helpilon por instrui la internacian lingvon.

Estas honoro por ni bonvenigi eminentan esperantiston tian al la 89a Brita Kongreso de Esperanto.

## Programo: vendredo, 9a de majo

| Horo | Ĉambro Zamenhof | Ĉambro Steele |
|---|---|---|
| 15.00-20.00 | **Akceptejo** | ne disponebla |
| 17.00-17.45 | **Prelego**<br>Southport bonvenigas<br>*Paul Gubbins* | ne disponebla |
| 20.00-22.00 | **Interkona vespero**<br>Kvizo<br>*Paul Gubbins* | ne disponebla |



## Programo: sabato, 10a de majo

| Horo | Ĉambro Zamenhof | Ĉambro Steele |
|---|---|---|
| 10.00-10.45 | **Solena malfermo** | |
| 11.00-11.45 | **Prelego**<br>Bona Espero – internacia fenomeno<br>*Roman Dobrzynski* | **Komencantoj**<br>*Malcolm Jones* |
| 12.00-12.45 | **Libroservo**<br>(Ankaŭ dum aliaj horoj ... vidu afiŝojn)<br>**Esploru la urbon ...** | **Publika prelego:**<br>'Find out about Esperanto' (angle)<br>*Paul Gubbins* |
| 15.00-15.45 | **Prelego**<br>Lingvolanĉilo<br>*Angela Tellier* | **Komencantoj**<br>*Joyce Bunting* |
| 16.00-16.45 | **Prelego**<br>La konciza enciklo-pedio pri originala E-literaturo 1887-2007<br>*Geoffrey Sutton* | **Konversacia rondo**<br>*Anica Page* |
| 17.00-17.45 | **Federacia festo**<br>Centjariĝas du federacioj<br>*Federacianoj* | **Konversacia rondo**<br>*David Kelso* |
| 18.00-18.45 | **Prelego 'Buchanan'**<br>Liverpola prononco (Scouse)<br>*John Wells* | **Babilejo**<br>Disponebla al tiuj, kiuj volas neformale kunsidi kaj babili. |
| 20.00-22.00 | **Distra vespero**<br>*Kontribuu ĉiuj!!* | |

## Programo: dimanĉo, 11a de majo

| Horo | Ĉambro Zamenhof | Ĉambro Steele |
|---|---|---|
| 10.00-11.45 | **EAB-jarkunsido** | |
| 12.00-12.45 | **Prelego** Esperanto – la ponto-lingvo de mia profesio *Roman Dobrzynski* | **Komencantoj** *Terry Page* |
| 14.00-14.45 | **Esploru la urbon …** | **Babilejo** Disponebla al tiuj, kiuj volas neformale kunsidi kaj babili. |
| 15.00-15.45 | **Esploru la urbon …** | **Junularo Esperantista Brita (JEB)** |
| 16.00-16.45 | **Diskuto** Esperanto kaj publico *David Kelso* *Stephen Thompson* | **Junularo Esperantista Brita (JEB)** |
| 17.00-17.45 | **Prelego** Esperanto-kanzonoj *Hilary Chapman* *Stephen Thompson* *Jack Warren* | **Babilejo** Disponebla al tiuj, kiuj volas neformale kunsidi kaj babili. |
| 20.00-22.00 | **Dezertinsulaj diskoj** Kun surpriz-gasto! *Stephen Thompson* **Fermo** | |

Bv. noti, ke ne ĉiuj horoj estas indikitaj en la programo. Kie 'mankas' horoj, vi estas libera por manĝi, butikumi, esplori la urbon – aŭ uzi propracele la kongresajn ĉambrojn.
*Please note that not all time slots are indicated in the programme. 'Missing' hours mean you are free to eat, go shopping or explore the town – or make use of the congress-rooms as you see fit.*



## Ekskurso: lundo, 12a de majo

**Vizitu Liverpolon, la ĉi-jaran eŭropan kultur-urbon.**



***Konstruaĵo "Liver"***

Interesatoj anoncu sin antaŭ lundo ĉe la kongresa akceptejo.

Vi renkontiĝos lundon je la 09.30 ekster la biletejo ĉe la stacidomo en Southport (Chapel Street) por trajni al Liverpolo. Tiam vi aĉetos mem vian trajnbileton (la LKK respondecas nek pri vojaĝkostoj nek pri enirbiletoj aŭ manĝoj).

En Liverpolo, esperantistoj gvidos vin tra la urbo, ekz. al la katedraloj, la halo Sankta Georgo, la artgalerio Walker, ktp. Viziteblos ankaŭ la 'Beatles'-muzeo, la restaŭrita haveno kaj la marmuzeo. Eblos ankaŭ pramŝipe transiri riveron Mersey al Birkenhead. Cetere ne mankas butikoj kaj restoracioj.

Post la ekskurso vi revenos trajne al Southport (aŭ eble reiros hejmen rekte el Liverpolo).

**Vizitindaj en Southport …**

**Lord Street**, kun ĝiaj butikoj kaj elegantaj verandoj; la ĝardenoj ĉe la **promenejo**, kun i.a. minigaŭfludejo; la dua plej longa **marponto** en Britujo, kun ĉefina muzeo (atingebla per trajneto); kaj, iom ekster la urbocentro, **Rotten Row**, duonmejlo da florbedoj, kun kafejo (atingebla piede), la pitoreska kvarteleto **Churchtown** kaj la **Botanikaj Ĝardenoj**, kun buntaj florbedoj, lageto, kafejo kaj muzeo pri la historio de Southport (atingeblaj per aŭtobusoj 49 aŭ 49a).

**Ekster Southport** … trajne al Freshfield por renkonti la sciuroin!

## Aliaj prelegantoj …

**… kiujn ni sincere dankas**



**Hilary Chapman –** interesiĝas aparte pri Esperanto-historio.



**David Kelso –** la sekretario de EAB kaj iama inspektoro pri edukado en Skotlando.

**Geoffrey Sutton –** aŭtoris angla-lingvan libron pri Esperanto-literaturo.



**Angela Tellier** – respondecas pri la lerneja projekto *Springboard to Languages*.





**Stephen Thompson –** prezidanto de NOEF; aktoro, muzikisto kaj instruisto.



**Jack Warren –** instruisto kaj muzikisto, kaj kunorganizanto de la barlastona somer-festivalo.

**John Wells –** prezidanto de EAB kaj de la Akademio de Esperanto.



Dankon ankaŭ al tiuj, kiuj gvidas konversacio- kaj diskut-rondojn: **Joyce Bunting**, **Malcolm Jones**, **Anica** kaj **Terry Page**.

### *Beginners!*

*If this is your first time at a British Esperanto congress – then **welcome**. We want you to feel at home among Esperanto-speakers: this is why there are special sessions for you in the programme (see 'Komencantoj'). Experienced users of Esperanto will offer language lessons and answer questions about Esperanto and its culture. Meanwhile, throughout the congress, please don't hesitate to chat to other Esperanto-speakers. Ask at the **libroservo** (book stall) what you should be reading to improve your Esperanto and to start exploring its literature. Don't be shy – we were all beginners once!*





## Sin prezentas la loka kongresa komitato …



Malantaŭe, de maldekstre: Ian Mac Dowall, Vivienne Isherwood, Peeter Aitai, Richard Phoenix; antaŭe, Andrew Wheatley, Jim Voiels. Ne fotitaj: Brendan Marsh kaj Paul Gubbins.

**Ĉambro Steele**: la dua kongresa ĉambro honoras la memoron de **John Steele**, aktiva esperantisto en Southport kaj en la Nord-Okcidenta Federacio dum pluraj jardekoj. Li estis sekretario de la Southport-grupo en 1962, kiam okazis en la urbo la lasta brita kongreso, kaj li estis honora prezidanto de la federacio. Li loĝis en Gosforth Road, Southport, kaj mortis 100-jaraĝa en 1996.

La loka kongresa komitato volas aparte danki al **Viv O'Dunne**, kiu administre kaj praktike laboris en la oficejo de Esperanto-Asocio de Britio por subteni la kongreson.

**La 90a brita kongreso** … okazos en Salisbury (17–19 de aprilo 2009). Ĝis revido venontjare en Wiltshire!